# *Usonaj kongresistoj vizitas la parlamentan sidejon en Kubo.*



Havano, 21 feb (RHK) Ana María Machado, vicprezidantino de la nacia asembleo de la popola povo, kaj Yolanda Ferrer Gómez, prezidantino de la komisiono pri internaciaj rilatoj de la kuba parlamento, akceptis en la Kapitolo havana grupon de usonaj kongresistoj kiuj faris viziton al la sidejo de la nacia parlamento.

La vizitantoj, inter kiuj estas la demokrataj le?ofarantoj Patrick Leahy, kiel givdnto), Tom Udall, Michael Bennet kaj la reprezentanto Jim MacGovern, trairis la restarigitajn ejojn de la Kapitolo de Havano, kaj same, povis vidi anka? tiujn kiuj ankora? estas en renovigata procezo.

La usona delegitaro estas en Kubo  ekde la 19-a de februaro kaj  ankora? planas renkonti?ojn kun la ministroj pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez , Rodrigo Malmierca, pri ekstera komerca kaj fremdaj investoj kaj Gustavo Rodríguez, de agrikulturo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/122178-usonaj-kongresistoj-vizitas-la-parlamentan-sidejon-en-kubo

# Radio Habana Cuba